La ekspozicio rakontas pri homoj kaj ilia ĉiutaga vivo: pri la labortempo kaj pri festado. Multaj aspektoj de la vivo dum la 2. duono de la 19. kaj la unua duono de la 20. jarcentoj estas por ni –la nuntempaj homoj – surprizaj, neklaraj, eĉ ekzotikaj. Ankaŭ por la homoj tiutempe vivantaj multaj okazaĵoj el ilia ĉirkaŭaĵo estis misteraj. Oni interpretis ilin laŭ la multcentjara tradicio, en la spirito de la tiutempa mondkoncepto.

Ni prezentas la popolkulturon de la etnografiaj regionoj, troviĝantaj nun en la kujavi-pomeria vojevodio kaj en la antaŭmilita vojevodio pomeria (Kujawy, ziemia chełmińska, Kaszuby, Bory Tucholskie, Kociewie, Pałuki, ziemia dobrzyńska, Krajna). Ni montras la vivon en vilaĝoj kaj malgrandaj urbetoj, kunligitaj kun agrikulturo kaj ni klare signas la specifan karakteron de la popolkulturo, kiu estis influata de la urbana kaj nobela kulturoj kaj ankaŭ rapidaj teknikaj kaj civilizaciaj ŝanĝoj.

La tereno, pri kiu rakontas la ekspozicio, estis enloĝata de diversetnaj kaj diversreligiaj homoj. Plej parte vivis tie poloj kaj katolikoj, sed tre grava estis ĉeesto de alinaciaj kaj diversreligiaj grupoj: multaj germanoj, protestantoj, nederlanddevenaj menonitoj, sed ankaŭ judoj, romaoj kaj rusoj.

Objektojn el la muzea kolekto ni montras tiamaniere, ke ili ilustru la ĉiutagan vivon kaj respondu je la fundamentaj demandoj, rilatantaj la vivon en pasinteco: kion oni manĝis, kiel vestiĝis, kiel zorgis pri higieno, kiel laboris kaj festadis, je kio oni kredis.

## *Naturo kaj historio*

La mondo de homo etendiĝas inter la naturo kaj kreata de li kulturo. Specon kaj formon de la regiona kulturo (ekz. kiel oni vestas sin, kion manĝas, kiamaniere laboras) influas la loka naturo. La dua tre grava faktoro, determinanta kulturformojn, estas historio. Civilizaciaj transformiĝoj, teknikaj inventoj kaj politikaj okazintaĵoj, rilatantaj la landon kaj ankaŭ la tutan Eŭropon, influis la ĉiutagan vivon de la loĝantaro eĉ en la plej malgrandaj loĝlokoj.

## *Pri vesto, higieno kaj manĝado*

Por vivi, labori kaj festi, la homo devis antaŭ ĉio zorgi pri siaj fundamentaj bezonoj: certigi por si nutraĵon kaj vestojn, venki malsanojn, almenaŭ sporade zorgi pri higieno. Ofteco, formo kaj efiko de ĉiuj ĉi agoj dependis de la individuaj gustoj,eblecoj, de la familiaj kaj mediaj principoj kaj de la kultursistemoj.

## *Vivritmo*

La familiaj festoj, ligitaj kun la vivociklo, signis ĝian ritmon ek de la naskiĝo ĝis la morto. Akompanis ilin ritoj kaj kutimoj, transdonataj de generacio al generacio, kiuj enkondukadis ordon kaj donis senton de sekureco. Kelkaj el ili devenis de la antaŭkristanaj ritoj de transiro, de la ritoj akompanantaj enkondukadon de homo en la antaŭe neatingeblaj por li sferojn. Bapto, Unua Sankta Komunio, nupto estis por homoj la plej gravaj okazintaĵoj kaj komencis la novajn etapojn de ilia vivo en familio, eklezio, en la loka socio.

## *Laboro*

Laboro certigis la vivrimedojn kaj okupis plej multe da tempo. Ĝi estis traktata kiel neceso, sed ankaŭ kiel granda valoro. Oni kulturis agron, bredis bestojn, okupiĝis pri komerco kaj metio. De rikolto kaj sukceso en la bestbredado dependis ekzisto de familio, sed ankaŭ la stato de tutaj socigrupoj, pro tio kun laboro ligitaj estis multaj ceremonioj, kiuj devis certigi bonstaton. Ili estis praktikataj paralele kun ĉiam pli modernaj mastrumadmetodoj, plifaciligantaj laboron kaj plibonigantaj rikoltojn.

## *Kiel oni festis kaj je kio oni kredis*

La malnovan popolan kulturon karakterizis religiemo, rilatanta la tutan vivon. Krom la kristana mondkoncepto ekaperadis ankaŭ fortaj magiaj konvinkoj, devenantaj de la antaŭkristana tempo.Tiuj ĉi elementoj formis kulturmodelon realigatan en preĝejo, sed ankaŭ hejme, dum la oficialaj diservoj kaj dum la popolaj ritoj, en la ritmo de preĝejaj festoj kaj jarsezonoj.

## *Dum libertempo*

En la tradicia popola kulturo, post laboro kaj festado, restis malmulte da tempo por ripozo. Antaŭ ĉio servis por tio vesperoj, kiuj helpis transdonadi de generacio al generacio buŝajn rakontojn.
En la 2. duono de la 19.jc., kaŭze de la rapide ŝanĝiĝantaj sociaj rilatoj, homoj povis dediĉi ĉiam pli multe da tempo por la okupoj nerilatantaj laboron. Komencis kreiĝi religiaj, kulturaj kaj sportaj societoj, arigantaj homojn kun similaj interesiĝoj. Pli multaj el ili disvastigis patriotismajn valorojn. Kreiĝis la societa vivo, oni aranĝis ekskursojn, dancadojn, festenojn.

## *Novaj horizontoj*

Kune kun la civiliza disvolviĝo homoj havis ĉiam pli multajn eblecojn ekhavi informojn pri la mondo kaj kontroli siajn ĝisnunajn opiniojn. Helpis tion lernejo, kiu instruis legi kaj ekkoni okazintaĵojn, ekz. pere de gazetoj. Ankaŭ la militservo, plej ofte plenumata malproksime de la loĝloko, estis siaspeca fenestro al la mondo. Multaj novaj ideoj aperis ankaŭ pro la kreskanta emigrado al la ambaŭ Amerikoj.

## *Serĉado de beleco*

Kreante aŭ aĉetante diversajn objektojn: ĉiutagaj hejmaj, religiaj kaj ritaj oni ofte atentis pri ilia estetiko. Gravis koloroj, ornamaĵoj, formo „agrabla por okulo”. Oni ĉiam strebis, ofte instinkte, plibeligi sian proksiman mondon, kolorigi ĝin. Kun la paso de tempo, influe de la nobela kaj urbana kulturo, tiu strebo fariĝis tiom grava, ke komencis ekaperi objektoj, kies unika funkcio estis ornamado de la homa ĉirkaŭaĵo.

La ekspozicio organizita okaze de la 50-jariĝo de la Muzeo en la jaro 2009
Financita de la Kujavi-Pomeria Vojevodia Konsilantaro

# SEKRETOJ DE LA ĈIUTAGA VIVO

La popola kulturo kaj ĝiaj limzonoj
de Kujavio ĝis Baltiko (1850-1950)

Muzeum Etnograficzne
im. Marii Znamierowskiej-Prüfferowej
w Toruniu